William Auld,

Vi estas maro

Vi estas maro, kiun mi navigas
sen kompasnadlo, sed kun gvidaj steloj;
sur via sino hula min kavigas
ventegoj aŭ min lulas zefirpeloj ...
Kaj malgraŭ fridoj, spite al la tromboj,
animo mia ĝojas sur l' ondaro:
mi volas veli plu sur viaj ondoj,
kaj fine droni, droni en la maro ..

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas William Auld *(∗1924-11-06 – †2006-09-11).*

Arg-1085-2184 (2014-08-06 14:06:25)

Pri la verkinto vidu la vikipedian retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/William_Auld`.